

1921-11-27-sergeant-fousek_1

Kara samideano

Jen sufiĉe longa tempo pasiĝis de la alveno de via letero de la 6. t.m. Ŝajnas al mi & hodiaŭ mi deziras respondi al mia malproksima korespondanto, almenaŭ mi povas komenci, ĉar post ¼ da horo mi devas eliri teonpreni ĉe S-ino kie mi aŭdos belan pianomuzikon & kanton. Tio ŝanĝos de la bridĝo (la fama kartludon kiun ni tiel ofte ludas). Verdire, de post 3 semajnoj mi havas tute mondanan, „societan“ vivon & preskaŭ ĉiu tage iris ien & ricevis iun. Tio lacigos iomete.

Kaj vi, kara **ombro?** de belaj horo en Praha? Kiel vi fartas? Ĉiam tre okupata pri viaj diversaj societoj, politikoj & muzikoj & ankaŭ pri viaj zorgoj patroj? Kiel mi esperas ke la beleta knabineto ne malvarmumiĝos je tiu vintra sed bela vetero. Nun ŝi estos baldaŭ 3 monatoj & sendube tiu tria monateco okupas grandan lokon en via koro & vivo. Ŝi certe ridetos al vi kiam ŝi parolas infanan lingvon, ĉu ne? Kisis ŝin por mi. Kiel mi ŝatus, ŝategus vidi ŝin!!!

Vi demandas al mi ĉu mi malkontenta pri la Kongresaranĝoj en Praha. Jen malfacila demando al kiu mi devas respondi! La koncertoj,

1921-11-27-sergeant-fousek_2

la balo, la laborkunsidoj (kvankam mi ne ĉeestis multajn) estis tre bone faritaj. Sed la ĝenerala organizado, precipe por la interrenkontiĝo de gekongresanoj estis malbona. La gazetaro kongresa estis malbona & maltaŭge estis ke oni ne povis ricevi liston de la gekongresanoj. Mi volis renkonti kelkajn Bohemojn & eĉ ne povis scii ĉu ili venis en Prahon. La ekskursoj estis malbone aranĝitaj ankaŭ. Sendube estis pro la tro granda nombro & ankaŭ ĉar la „estroj“ ne sin okupis multe pri tio.

Vi parolas pri viaj politikaj kunvenoj, societoj, k. t. p. Estas strange ke mi korespondas kun nur du Bohemoj & ambaŭ okupiĝas pri Politikaj aferoj – vi & s-ro Sibrava el „Znaim“. Sed por li estas vera profesio & li gajnas sian vivon tiele. Li vojaĝos multe en sia distrikto sendube farante paroladojn. Li certe estas oratoro. Li estas kontraŭ katolikoj. Tre tre interesaj estas liaj leteroj. Li rimarkigis al mi eraron mian = ke mi malbone metis la akcenton sur la vorto „Přelouč“. Mi metis ĝin sur „e“ anstataŭ ol „ř“ kaj tio faris „Prielouč“. Vi ankaŭ sendube rimarkis tion. Verdire, mi ne atentis multe, ne tre bone sciante kie ĝi devas esti.

1921-11-27-sergeant-fousek_3

Ho! Kiel mi bone rememoras kiam vi provis elparoligi al mi tiun teruran elparolon! Přelouč!!! Kiel mi timis, dirante ĝin antaŭ vi, viajn mokojn.

Estas strange ke momentoj tiel mallongaj impresos dum tuta vivo. Kaj ĉiuj Kongresoj estas same!!!

Mi memoras ke vi konfesis al mi ke vi ĉiam serĉas pri vero en tiu mondo. Kaj kiam vi pensis fine trovi ĝin vi tuj ekpensis ke ĝi ne estas la bona vero. Kiel mi bone komprenas tiun staton de la animo & vian konverton al religio Protestanta, sed mi miras ke eĉ tiu-ĉi religio povas plene kontentigi vin kies animo serĉas, serĉas ĉiam.

Mi tute ne rimarkis ke vi ne estis amuzanta dum la lasta vespero en Praha. Ĉu vi ne opinias ke, kiam tri personoj ofte kune kun dum 5 tagoj, devas la morgaŭan tagon sin forlasi sen espero de revido ebla en tiu mondo, tri personoj kunigitaj per nia bela lingvo & ĝia interna ideo de frateco. Ĉu vi opinias ke ili bezonas esti „amuzataj“ kiel vi diras? Mi, ne. Adiaŭoj estas tro malĝojaj por ilin kaŝi per nevera „amuzado“.

Mi vidas ke laŭ la situacio de via hejmo nova kiu estas tiel proksime de ĉio ke vi certe ne ekzercados multe vian fizikan korpon. Ĉu vi ne timas ke vi ne dikiĝos tro se vi neniam prenos fizikajn ekzercadojn – ke viaj muskoloj malfleksebliĝos?

1921-11-27-sergeant-fousek_4

Kiam vi skribis al mi ventego furioziĝis ĉe vi... & ankaŭ tie-ĉi sed ho-ve! Ĉe nia rezultanto de tiu ventegoj estas katastrofoj sur maro, ŝippereoj k. t. p. kiom da suferoj teruraj. Sed ankaŭ kiel la maro estas vidinda.

La ondegoj estas mirindaj. Mi multe skribas pri la maro & miaj promenadoj sola apud ĝi, al la s-ro Sibrava el Znaim kiu neniam vidis la maron & kiu estas tre interesata.

Hodiaŭ estas -7°centigradoj & vere estas malvarme, sed feliĉe sen vento. Sed bela suno brilas. Posttagmeze mi iros ĉe amikino por ludi pianomuzikon, duetojn, simfonioj de Beethoven, Handel de Haydn-Mendellsohn & de Leon d'Ourville, k.t.p. Sed mi multe forgesas. Poste ni ludos „bridĝon“. Morgaŭ mi iros al balo & dancos. Mi ne dancis de post Praha balo. Estas longe sed mi memoras, miajn impresojn en tiu belega balo kvazaŭ ĝi okazis hieraŭ. Kia varmego.

Mi devas fini mian nespritan leteron. Eble tro da tempo pasiĝis inter via letero & mia respondo. Pardonu min se mi ne sukcesis interesigi vin, kara korespondanto & skribu baldaŭ & rakontu kiel fartas via karulino Eva, via edzino kiun mi salutas & aliajn interesaĵojn.

Tutkorajn salutojn & amike Alice Sergeant

Ĉu vi renkontis Kap-on Beran el Leitmeritz..?? Li ankaŭ skribas al mi , li estis nia karavanestro dum la Postk.vojaĝo. Tre afabla & ĝentila.